

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

NIAJ PLANOJ

☛ ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

- * Regulaj Klasoj en sabato: Klaso por legado de "Tra dezerto kaj praarbaro", Klaso por legado de "Vivo de Lanti" / Jokohama Salono.
- * Regula Klaso en merkredo.

RUDIMENTA KURSO DENOVE

Ni planas havi Rudimentan Kurson de okt. 27 ĝis jan. 26, en la supra loko. Kotizo estas 6000 enoj por la tuto, kun "Hanako lernas Esperanton" kiel lernolibro.

HAMA-RONDA VESPERO OKTOBRA

*okt., 20, 17h00-19h00, ĉambro 709

Temas pri "inicado al la esperanto-kursoj". S-ino DOI Ĉieko kaj aliaj parolos, kiel sukcesigi esperanto-kursojn.

HAMA-RONDA VESPERO NOVEMBRA

*nov., 17, 17h00-19h00, ĉambro 604

S-ro Nanba Humiharu rakontos pri sia vojaĝo al Saĥaleno, Rusio.

☛ EKSTER LA REGULA KUNVENEJO

INTERNACIA FESTO EN AŬTUNO

*okt., 20 kaj 21, en la parko "Zoo-no-hana"

Ni partoprenos ekspozicion, kadre de la "Jokohama Aŭtuna Internacia Festo 2012", en la parko apud la haveno de Jokohamo. Semajnon poste, nia rondo organizos Rudimentan Kurson. La Festo mem omaĝas al

Afriko, ĉar en la venonta junio 2013, la urbo Jokohamo gastigos jenan konferencon: la 5-a "Tokia Internacia Konferenco pri Afrika Evoluigo". Rilate tion, nia rondo ekspozicios i.a. pri afrika esperanto-movado.



ZAMENHOFA FESTO

EN LA URBO ODAWARA

*dec., 15, en la urbo Odawara

La Zamenhofa Festo de la rondoj en Gubernio Kanagawa okazos en la "Internacia Ĉambro" de Urbo Odawara, gastigate de la Esperanta Klubo en Odawara. Inter alie estos prelego de juna verkisto MAMIYA Midori pri "mia literaturo kaj Esperanto".

TIEL OKAZIS

KUN Ges-roj AMIS

*aŭg. 25, en "Tikyu-plaza"

El Kanado vizitis nin ges-roj Ĵenja kaj Joel AMIS, kiuj rondiras Japanion. 5 rondanoj bonvenigis ilin per babila kunsido kaj posta komuna vespermanĝo.

SOMERAJ SPERTOJ PREZENTITAJ

*sept. 1, 15h00-17h00

En la ĉambro 604 de la kutima kunveno okazis speciala kunveno, en kiu oni parolis pri siaj someraj spertoj. Pri la vjetnama UK mem aŭ sekvantaj postkongresoj parolis s-ino AIDA Yayoi, s-ro AIDA Kiyosi, s-ro SIBAYAMA Zyun'iti, s-ro KOYAMA Takesi kaj s-ro SUZUKI Keiichiro. Pri Zamenhofaĵoj en Vieno, ĉefe pri la esperanta biblioteko, parolis s-ro IWAYA Mituru.

■ Eldonas Doi Hirokaz ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti
 ■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
 ■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
 ■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

LEGOKUNVENO



En la 8a de septembro, ni havis legokunvenon, kun 5 legintoj de la libro
“LEE Chong-Yeong, gvidanto nia” de Korea Esperanto-Asocio.
Ni metas eseon de Mizro Iwaya pri la libro.

LEE Chong-Yeong, gvidanto nia

Mizro Iwaya

Mi konfesas ke mi donace ricevis tiun libron antaŭ du jaroj, sed neniam tralegis ĝin. La volumo estis tro granda, la enhavtabelo ne aspektis al mi interesa...

Nun mi tralegis ĝin kaj trovis diversajn interesaĵojn. Tial mi devas danki al tiu ĉi legkunsido, kiu donis al mi ŝancon serioze legi tiun libron. Precipe tre sincera sinteno de la aŭtoro tre impresis min. Tiu ĉi tendenco rilatas ne sole al Esperanto, sed ankaŭ al liaj profesiaj taskoj. Li estis profesoro pri komerco kaj konsilisto mondvasta. Li estis unu el la konsilantoj de ĉina ekonomia reformado kaj malfermado. Tiamaniere liaj atingajoj troveblas en diversaj lokoj.

Li estis prezidanto de UEA en jaroj 1995-1998. Mi ĝis nun preterlasis la fakton ke li iniciatis la unuan Nitobe-simpozion kaj la Manifeston de Prago en 1996. Ili restas ankoraŭ nun gvidaj principoj de nia movado. Ankaŭ ĉi tie troveblas lia sincera kaj praktika tendenco. Li fakte diris multon kaj samtempe agadis multon.

Ni ne bezonas blinde sekvi lin. Tia inklino devas esti lia evitindaĵo. Kion ni povos fari sen li? Precipe korea Esperanto-movado lastatempa tiras mian atenton pli multe ol antaŭ la lego de la libro.

RAPORTO

**RAPORTO EL LIONO**

En la septembra bulteno “RHÔNE Espéranto” de CERL (Centro Esperanto de la Regiono Liona, Francio), aperis jena artikolo. Dankon pro la utiligo de nia DVD.

=====

PRELEGO PRI JAPANIO

Sabaton la 1an de septembro disvolviĝis la unua kultura renkontiĝo de la nova sezono. 17 Esperantistoj kuniĝis en la ejo de Cedrats por aŭskulti prelegojn pri Japanio kaj, pli precize, pri Jokohamo.

.....

La kultura kunveno komenciĝis per parolado

de Joseph Catil pri la ĝemelaj kluboj. CERL havas kontaktojn kun diversaj esperantistaj kluboj en la urboj ĝemelitaj kun Liono, ĉefe Frankfurto, Milano kaj Jokohamo.

Poste Thierry Tailhades prelegis pri la urbo Jokohamo kaj ĝia historio. Meze de la 19a jarcento, Jokohamo estis eta vilaĝo kaj siatempe la imperiestro decidis krei tie havenon por akcepti eksterlandajn ŝipojn. Hodiaŭ, tiu urbego estas unu el la plej grandaj havenoj el la mondo kaj havas 3,7 milionojn da loĝantoj. Li ankaŭ precizis, ke la urbo plurfoje estis rekonstruita pro tertremoj, kaj ni spektis esperantlingve filmon senditan de la klubo de Jokohamo pri la restarigo de la urbo post la tertremo de la jaro 1923.

Gastama paŭzo okazis, kaj fine, Hannes Larsson kaj lia edzino Gisele prezentis al ni fotojn pri sia vojaĝo en Japanio, kies unu celo estis viziti japanajn Esperantajn societojn. Ili precipe vizitis la regionojn de Kioto kaj Tokio.

ESEO

Novaĵoj Tamtamas elsendita de 3ZZZ

Aida Yayoi

En Hanoja UK kiam mi partoprenis en la kongresa programero AERA (Asocio de Esperanto-Radio-Amantoj), en la 2-a de aŭgusto, mi renkontis s-inon Franciska Toubale, reprezentanto de aŭstralia radio-elsendo 3ZZZ. Ŝi diris al mi, ke ŝi ĉiam legas nian organon *Novaĵoj Tamtamas* (NT) kaj elsendas elektitan materialon por aŭskultantoj de 3ZZZ. Ŝi menciis pri la eseo “Rara sperto de aviadilo” aperinta en la junia numero de NT. Kun dankemo sed iom da embaraso mi aŭdis ŝian voĉon, ĉar lastatempe mi ne estas entuziasma aŭskultanto de 3ZZZ. Jam pasis la tagoj de hazarda kaj freŝa aŭskultado de niaj artikoloj sur NT. Post la AERA kunsido ŝi

ankaŭ sciigis al mi, ke s-ro Trevor Steele parolos pri sia verko en la programero “Aŭtora Duonhor”. Mi ne sciis ĉu ŝi elsendis nian plej lastan legokunvenon pri lia romano “Flugi kun kakatuoj”, nek demandis ŝin pri detala informo. Mi tamen sentis ŝian afablecon al nia organo NT, kaj emociiĝis. Kia ĝojo havi tian simpatianton en eksterlando! Por danki ŝin, mi devos aŭskulti la 3ZZZ-on pli diligente.

Estas “Arkivo de 3ZZZ Radio en Esperanto” en <http://melburno.org.au/3ZZZradio/>

JAPANISME POR LA RUSOJ (2)

notita de Anatolo Gonĉarov



En la libro: El Japana Literaturo, 1965, Tokio:

En tiu tempo feŭdismaj elementoj ankoraŭ daŭris sian laboron, prenante al si temon el la eŭropigita socio, sed iliaj esprimo kaj sentimento kompreneble restis nenio alia ol tiu de “**simio vestita eŭropmaniere**”. p.2.

Ke li lasis sin falegi de sur sia besto - ho, **kia ago, tia pago!** p.18.

[la rusoj: Kia semo tia la rikolto]

Li **eltrinkis per unu tiro** brandon... “Mi dezirus **kote ebriiĝi** kaj ĉion frakasi!” - li kriegis... p.46.

Ion elbuŝiginte per unu-du vortoj, apenaŭ la virino eliras al la koridoro, aŭdiĝas sonoj de vangofrapoj, sed tuj poste ekster la ĉambro ekregas **silento malagraba kaj tiel soleca kiel kloaka akvo**. p.50.

“Tiu sinjoro diris, ke li volas kunvojaĝi vin”. “Ha

bone, ja tre agrable! Respondis ŝi senĝene.” “**Sur la sama vojo kun la sama ĝojo**”; p. 68.

Morgaŭ ni ekiros, **eĉ se pluvos lancoj**. Postmorgaŭ estos la kvardeknaŭa tago post morto de la bebo... p.74.


..sed kiam via patro komencis malŝpari en diboĉado, ĉio pereis **kvazaŭ oni elmetus ilin sur bambufoliojn de festo kaj svingus**. p.96.

Kuroemon sulkigis siajn brovojn kaj poste diris: “**La granda rado sin turnas tro mal-rapide**”. p.130.

..se tiel diri, serĉi kanajlon sen domicilo tra la tuta lando, **similas serĉi unu grenon en granda riz-stoplejo**. Neniu estis certa de kia pajlsako ili komencu tuŝi... p.135. [La ruso dirus Serĉi kudrilon en fojnostako, rim. de A.G.]

(daŭrigota)

BELETRO



Dormema urbo(1)

(眠い町)

verkis Ogaŭa Mimei

esperantigis AIDA Kiyoshi

Ĉapitro 1

La nomo de ĉi tiu knabo estis ne konata. Mi provizore nomis lin Kej. La knabo iam vojaĝis tra la mondo. Iun tagon li alvenis al stranga urbo. Oni nomis ĝin “Dormema urbo”. Ĝi aspektis ial malvigla. Kaj la urbo estis tiel kvieta, ke neniu sono aŭdiĝis. Temis pri konstruaĵoj ĉiuj estis eluzitaj kaj oni ne riparis difektitajn partojn. Neniu fumo leviĝis de kamentuboj, ĉar neniu fabriko troviĝis en la urbo.

La urbo etendiĝis nur laŭlonge de la ebenaĵo. Tamen, kial oni nomis ĝin “Dormema urbo”? Estis mistera fenomeno, ke ĉiuj, kiuj preterpasis la urbon fariĝis dormemaj spontane pro laciĝo. Kelkaj vojaĝantoj, kiuj tage preterpasis la urbon neatendite sentis sin lacaj kaj fariĝis dormemaj, kiam ili venis en la urbon. Ili volis paŭzi dum ioma tempo sub la ombro de arbo en la ekstremo de la urbo aŭ sidi sur ŝtono en la urbo. Intertempe ili sentis dormemon kvazaŭ ili estus altiritaj al tre profunda truo kaj finfine senkonscie dormis. Kiam ili vekiĝis, jam krepuskiĝis. Kaj ili surprizite ekstaris kaj rapidis la vojon.

Tiu ĉi rakonto disvastiĝis de buŝo al buŝo kaj vojaĝantoj timis preterpasi la urbon. Troviĝis homoj, kiuj evitis preterpasi la urbon kaj ĉirkaŭiris la vojon.

Kej volis vidi la urbon, kiun homoj timis. Li piediris kun scivolo direkte al la dormema urbo havante firman intencon ne dormi.

Ĉapitro 2

Ja, kiam Kej venis ĉi tiun urbon, ĝi estis maltrankviliga urbo, kiel homoj diris. Neniu sono aŭdiĝis kaj profunda silento regis la urbon. Kaj tago estis kvazaŭ nokto. Ankaŭ neniu fumo leviĝis kaj nenia vidindaĵo troviĝis en la urbo. La

pordo de ĉiu domo estis fermita. La tuta urbo estis kvieta kvazaŭ mortinta.

Kej promenis laŭlonge de la muro farita el flava tero kaj enigardis en la internon tra la fendo de la pordo. Sed la interno de la domo estis tiel silenta, ke li ne sciis ĉu iu homo loĝis tie aŭ ne. Fojfoje li vidis, ke malgrasa hundo, kies paŝoj estis ŝanceliĝantaj, vagis en la urbo. La vojaĝanto eble venis ĉi tien kondukante la hundon, sed ĝi perdis la mastron en la urbo. Do, li pensis, ke la hundo tiele vagadis en la urbo. Dum li esploris la urbon, senkonscie lia korpo laciĝis.

“Ha ha, mi laciĝis korpe kaj fariĝis dormema. Mi ne volas dormi ĉi tie. Mi devas elteni dormemon.” –diris Kej kuraĝigante sin mem. Sed tamen li sentis sian korpon paralizita iom post iom kvazaŭ li estis anestezita. Ĉar li fariĝis tre dormema kaj li apenaŭ povis sinteni, li senkonscie ekdormis kun ronko apogante sin sur la muro. (daŭrigota)

Pri la aŭtoro

Ogaŭa Mimei (小川未明) (7.apr.1882 ~ 11.maj.1961) estis novelisto kaj infanliteratura verkisto, naskiĝinta en la urbo Takada (nuna Joecu) en la gubernio Niigata. Li diplomiĝis el Universitato Waseda (Ŭaseda). Li gajnis la postenon kiel noveliston pro la novelo “Hajlo kaj neĝpluvo” en 1904. En la jaro 1926 li decidis verki nur fabelojn kaj fariĝis la unua prezidanto de Japana Infanliteraturo-Asocio en 1946. Li ankaŭ gajnis la Kulturmeritan Premion en 1951. La ĉefaj fabeloj estas “Ora ringo”, “Ruĝa kandelo kaj marvirineto” kaj “Sovaĝa rozo”.